**GENERALA ASEMBLEO**

La lastan lundon de januaro, okazis GENERALA ASEMBLEO DE MEL. Vidu protokolon (akton) en aparta folio.

**KOTIZO POR 1994 KUN DONACO**

La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj du jaroj. Bv. **sendi ĉekon po 2.000 ptjn**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL. **Se vi pagas rekte ĉe la Liceo (lunde vespere) vi ricevos kiel donacon, la libron "Historia del Esperanto en Madrid"**, dulingva versio verkita de Lupe Sanz Bueno.

**RENKONTI_O EN GERMANIO**

Ana Manero kaj Manolo Parra kiel kutime dum lastaj jaroj partoprenis en la Kristnaska Seminario organizita de Germana Esperanto-Junularo.

**ARĜENTA INSIGNO KUN VERDA STELO**

Farita de juvelisto simpatiano de Esperanto MEL oferas po 300 ptj esperantan insignon farita el arĝento kun emajloj blanka kaj verda. Sendoj po dek (10) antaúpago de 2.700 ptj pere de poŝtmandato al Madrida Esperanto-Liceo inkludas sendokoston .

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º
Mardeĵĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79
Venontaj programoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4º:

6-an februaro - Vizito al Aviadila Muzeo en Cuatro Vientos (Dimanĉo matene)
21-an februaro.- Madrido, kvartalon post kvartalo. Prelegas Lupe

**"Nia voĉo" DISTRIBUADO**

Pro la altigo de la poŝtmark-prezo:14 ptj por Madrido kaj 18 por
provincoj ni nur sendos al jenaj: membroj de MEL kiuj pagis 1993 kotizon, hispanaj esperantaj grupoj kiuj sendas al MEL siajn revuojn. Aliaj grupoj povas ricevi ĝin kontraŭ 72 poŝtmarkoj de 14 ptj.(1.008 ptj) aŭ 56 de 18 ptj.

**ESPERANTAJ LIBROJ EN PUBLIKAJ BIBLIOTEKOJ**

MEL, kune kun malavara donaco de liceano, disdonis 52 pakaĵojn kun la libroj "Esperanto fenómeno de la comunicación" kaj "Parolu Esperanton" al publikaj bibliotekoj de Madrido (13 al bibliobusoj de la provinco, 22 al Najbaraj Publikaj Bibliotekoj kaj 17 al Autonomaj Publikaj Bibliotekoj en la ĉefurbo).

**NUR POR KELKAJ**

Liceo havas malgrandan stokon de la libro "El esperanto en 20 lecciones" de V. Inglada. Eldonita en **1931**. Ni sendos tiun ĉi libron plus "Seminario pri sporto-1982 (kun sporta terminaro en esperanto)" nur po 1.000 pesetojn (inkludas sendokoston). Anta_ŭpago necese pere de poŝtmandato al Liceo.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4º
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

## UNESKO REZOLUCIAS PRI ESPERANTO

**Post Montevideo (1954) kaj Sofio (1985), la 27-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis novan rezolucion pri Esperanto. Tio okazis la 16-an de novembro en la Pariza Unesko-sidejo.**

## ESPERANTO EN RADIO

Okaze de la atingo de publika utileco de HEF, Radio Nacional-Guadalajara intervjuis al Lupe kiel esperantistino de la provinco. Ankaú Miguel Fernández estis intervjuita en Radio COPE de Madrido kie li legis proprajn poemojn.

## EKDE SEGOVIO

Ĉiun merkredon en Sportdomo okazas esperanto-rondo gvidata de Manolo Parra. Kutime partoprenas Ruben, infano kiu ĉeestis Infanan Kongreseton en Valencio, Amparo kiu esperantiĝis en kurso de Cesar de Mosteyrín kaj la juna valoro, Daniel. Antaŭen kuraĝe segovianoj!!.

La humora designisto de la ĵurnalo "El adelantado de Segovia", Madrigal, sendis desegnon kun novjardeziroj por hispanaj esperantistoj.

## INFORMOJ AL NAJBAROJ DE MADRIDO

Madrida Esperanto-Liceo sendis al ĉiuj najbaroj de la nova strato "Doctor Zamenhof" de Madrido, inform-flugfolion pri esperanto kaj kopion de la ĵurnalo Heroldo de Esperanto kiu aperigis fotografaĵon de la strato. Ili devas ekkoni Zamenhofan lingvon.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

78-a Brita kongreso. Richmon on Tames (Surrey) 1/4 aprilo
53-a HISPANA KONGRESO 1994. MALAGO 16/21 JULIO
79-a UK 23/30 julio. Seulo (Koreio)
**80-a UK 1995 Tampereo (Finnlando)    82-a UK 1997 Australio**